

OKTOBRO 2014



La «*Esperanto-Gironde*» *Infirmilo*

N° 141

JAM AŬTUNAS...



un pas de géant pour l'humanité

ESPERANTO

giganta paŝo por la homaro



100^e Universala Kongreso de Esperanto
Uka, 29 julio - 10 aŭgusto 2013



SED LA SUNO BRILAS KIAM NI KUNKANTAS

La Kompanoj: Plian gigantan paŝon al Lillo!

Sabaton 11an kaj dimanĉon 12an de oktobro pli ol tridek gekantantoj ĝuis unuan kanzonostaĝon kun La Kompanoj.

Naturamiko, lilla giganto, invitis esperantistojn ornami lillan placon per kanzonbukedo okaze de la 100a UK en julio 2015. Prepare al tiu rendezuo, La Kompanoj proponas repertuaron de famaj francaj kanzonoj tradukitaj en esperanto. Jarfine estos elŝuteblaj la elektitaj tekstoj, partituroj kaj muzikoj. Tiel ĉiu ajn povos indvidue prepari sin al kunkantado. Tamen la vera celo restas grupe kunkanti. Tial atendente la rendezuon en Lillo, La Kompanoj animos unutagajn aŭ plurtagajn kanzonostaĝojn. La unua ĵus okazis semajnfine la 11an kaj 12an de oktobro en Artigo-ĉe-Bordo. La datoj kaj lokoj de la ceteraj restas publikigitaj post konfirmoj.

Se FaMo kaj Marcelo Redulez dekomence impulsas la projekton, FaMo (denove li! sed li ja estas la ĉefa animanto!) kun sia akordiono kaj Bernardo Legeay kun sia suzafono estas la bazo de la muzikanta skipo. Rapide al tiu duopo aliĝis ankaŭ Isabelle Diaz (piano kaj akordiono) kaj okaze de tiu staĝo Fransuazo Noaro' (violono) kaj Pjer Buvje' (gitaro kaj kontrabaso). Ni ne dubas, ke aliaj muzikantoj, eĉ muzikistoj, iam kunludos, ĉar jam esprimis sian emon Nikolin' (gurdo), Françoise Carrieu (diatona akordiono), eĉ Marita Kruijswijk kaj Marian Nesse, flutistino kaj akordionistino de Kapriol'!

Sabaton matene, la muzikantoj agordis siajn instrumentajn partiturojn. Mirinde kiel ili profesinivele akompanis ĉiujn kanzonoprovojn dum la tuta semajnfino kvankam unuan fojon ili kunmuzikis!



Plezure kunkanti jen simpla feliĉo por amatoroj, kiaj ni estas La Kompanoj! Dum la semajnfino estis programitaj kvar provaĵoj, kiuj daŭris unu horon kaj duono (du sabaton posttagmeze; unu dimanĉon matene kaj unu posttagmeze). Krome sabaton vespere du horojn daŭris la kunkantado ilustrita de arte preparitaj lumbildaroj.

Inter tiuj ĝojaj «labortempoj», malfermaj interŝanĝoj okazis dum bonvenaj paŭzoj kun bongustaj manĝoj kaj agrablaj te- aŭ kaf-klaĉadoj...

Tiuj du tagoj estis decidaj pro pluraj kialoj: unue ili konfirmis la konvikon de la instigantoj, ke indas vivigi tiun projekton; due ke la elektita repertuaro estas kantebla kaj eĉ kunkantinda; trie ke tiaj kanzonostaĝoj estu programitaj dise tra Francio antaŭ la venontjara UK kaj poste, kial ne ankaŭ translime...

FaMo pretas animi laŭ invitoj de lokaj grupoj por minimume dekkvin partoprenantoj. Ankaŭ Marcelo venos, se li estos disponebla... sed kunkantontoj ne mankos, La Kompanoj tion asertas!

La 50-paĝa broŝuro kun la tekstoj kaj partituroj estas akirebla kontraŭ 5 €; plus sendokostoj se vi mendas ĝin ĉe Marcelo Redulez – chemin de l’Hortie – 33880 Cambes.

Pliaj informoj ĉe FaMo fabricemorandeu@gmail.com
aŭ Marcelo marcel.redoulez@wanadoo.fr

Marcelo



PILGRIMA TAEKO



Hiroŝima esperantistino Taeko Osioka pilgrimis laŭ la jakoba vojo dum junio kaj julio ĉi jare. Ŝi estas konata de la ĝirondiaj esperantistoj ĉar ŝi vizitis nin.

Taeko ekiris la vojon komence de junio en la urbo Garazi (Sankta Johano ĉe Montpasejo), kaj la sepan de junio ŝi atingis Pampluno-Irunjon. Tie ŝi renkontiĝis kun lokaj esperantistoj Rafa kaj Mirren en urbo svarma pro manifestacioj por respubliko kaj decidrajto.

Post tranokto en Kaseda ŝi vizitis la vilaĝon Xabier, naskiĝloko de la katolika jezuito Francisko, misiisto en Japanio en la 16a jarcento.

De Xabier ŝi reiris al Pampluno-Irunjo, kie reekis la piedpilgrimado al Santiago de Compostela (Sankta Jakobo de Kompostelo).

Taeko vikle aktivis en porpaca asocio en Hiroŝimo kaj pere de tiu pilgrimado ŝi klopodis disvastigi la bezonon de tiu ideo.

Spite al plandaj blazoj Taeko plenanime pilgrimas kaj ĝoje kaj varbe diskonigas esperanton ĉe la vojoj. Brave Taeko!

Rafa Blanco



PRI LA GRUPO DE GUJAN-MESTRAS

Nia asocio havas novan kasiston:
Bernard Vidal, 43 allée de Campès 33470 - Gujan-Mestras.

Poŝtelefono: [06.95.02.85.00](tel:06.95.02.85.00) - Retadreso: bernard.vidal@esperanto-france.org

Cetere la 5an kaj la 6an de septembro, nia asocio partoprenis en la asocia forumo. Vidu la blogon gm-kokcinelo.blogspot.fr. Nia temo estis «Esperanto, por-do al multlingvismo».

La gazeto *La Dépêche du Bassin* publikigis artikolon pri Esperanto.

Nia asocio aĉetis sian unuan tabulkomputilon (dek coloj) por la kurso, por enmeti librojn, aŭdlibrojn, muzikojn, kelkajn filmojn kaj multajn retpaĝojn, vortarojn, kursojn... eĉ ankaŭ Skajpon.

Bernard Vidal

Novriĉulo (NR) kaj Herbomanĝanto (HM) sur aŭtoparkejo de ĉiovendejo

*(inspirita de anekdoto prezentita de «la maljunulina minuto», elsendeto de ARTE-TV
teatrigita en esperanto de Marcelo - dediĉe al la Kvaka teatra trupo - aŭgusto 2012)*

NR: Ja mi rajtas fieri! Mi sukcesas en la vivo! Hodiaŭ mi malmodeste festu mian atingitan povon. Jen mi ĵus aĉetis grashepataĵon, kaviardon, fajnajn buŝeojn kaj delikatajn frandaĵojn... kaj kompreneble krome krone ĉampanbotelojn! Nu, eble pro pli frua kutimo mi plu aĉetadas en tiu ĉi ĉiovendejo. Sed mi nun parkas mian tute novan aŭtegon sur la plej supra etaĝo de la parkejo. Ha! Jen ĝi! Ĉu vi ne envias ?

NR enŝovas siajn aĉetaĵojn en la malantaŭan kofron de sia aŭto, kiam li rimarkas enirintan HM-n. Ĉi lasta per tranĉileto detranĉas herbaĉon kaj formanĝas ĝin.

NR: Hej homo! Kion vi do faras ĉi tie?

HM: Bonan tagon, moŝta sinjoro. Nu, mi estas mizera. Mi simple rikoltas herbaĉetojn, kiuj kreskas ie tie inter la betonaĵoj. Kaj mi formanĝas ilin. Jen mia nura nutraĵo.

NR: Nekredeble! Sed ili estas malgrandaj, malbonaj. Ne HoMo! Tiel vi ne povas daŭrigi. Jen mi invitas vin ĉe mia hejmo. Jen mia karto.

HM: Ho! Kiel afabla vi estas sinjoro. Mi ne scias, kiel danki al vi. Tamen mi ne povas konsenti.

NR: Ĉu vi ne povas?

HM: Nu, mi ne vivas sola kaj...

NR: Ja kompreneble ankaŭ vian edzinon mi invitas. Vi kune venu al mi.

HM: Kiel malavara vi estas sinjoro. Mi estas sincere kortuŝita. Tamen ni ne povas konsenti.

NR: Kial vi ne povas?

HM: Jen: ni havas kvar gefilojn kaj...

NR: Bone! Bone! Ju pli da invititoj des pli bone.

HM: Ĉu vere, sinjoro? Sub nia sama tegmento loĝas ankaŭ aliaj familianoj: gepatroj, gefratoj, geonkloj kaj gekuzoj.

NR: Neniu problemo, mi ripetas. Venu multnombraj. Vian tutan familion regalos mia ĝardeno. Imagu, ke pro troa laboro kaj sekve manko da libera tempo mi de du monatoj ne tondis la herbaĉojn. Ili nun altas je pli ol duonmetro!

ESPERANTO-GIRONDE
ĜENERALA ASEMBLEO
28an de SEPTEMBRO 2014
en MONTENDRE
(Ambaŭlingva protokolo far Janine)

Ĉeestas: Bruno; Claudine, Marcelo, Bernardo, Morine, Monique, Christiane, Michel, Janine, Joël, Gloria. Pli poste alvenos Violette.

Senkulpigitaj: Rose, Yannick.

Rajtigilo de Michel Lavergne al Bernardo.

Invititaj (Grupo de Montendre): Lucienne Laroche, Liliane Chenu.

Bernardo: salutas la ĉeestantojn kaj transdonas informon en la franca. Monique Juy, tête de liste EDE aux élections européennes a invité Bernardo à se rendre à la journée portes ouvertes à Sud Ouest le 27 septembre dans le but d'établir des contacts avec des journalistes concernant les activités d'Espéranto Gironde.

Cependant cette journée portes ouvertes concerne l'aspect technique de la fabrication du journal, l'imprimerie etc. Donc les journalistes n'y sont pas présents.

De toute façon Bernardo a déjà été il y a quelques années en contact avec un journaliste de Sud Ouest qui lui a clairement fait savoir que l'espéranto n'intéresse pas du tout le journal.

Bernardo: transdonas la korajn salutojn de Ŝelin', kiun li vidis la tagon antaŭan. Ŝi ŝajnis bonfarta kaj la kapo ege bone funkcias. Li senkulpigas Rose, kiu deĵoras por la municipo kaj voĉdonas.



1. Morala raporto (Bernardo)

Hodiaŭ finiĝas mia dua jaro kiel Prezidanto de nia asocio. Ni certe ne laboris laŭ la sama ritmo ol dum la antaŭa jaro: ne okazis kongreso en Artigues, do ni ne devis teatrumi aŭ gvidi ekskursojn. Tamen, la lasta kongreso revigligis iaman ideon (de kiam mi estis la sekretario de ESPERANTO-GIRONDE, t.e., el la materialo, kiun ni amasigis por prepari la diversajn kongresojn, kiujn ni organizis en Artigues, kial ne labori pri turisma gvidlibro?

Tiu ago forportis nin dum la tuta jaro, des pli ke la venonta UK okazos en Francio, kaj verŝajne kelkaj partoprenontoj vojaĝos tra nia lando, ĉu antaŭ, ĉu post la kongreso. Do se ili intencas viziti nian regionon, la dokumentoj faritaj de nia grupo espereble povos helpi ilin en ilia malkovro de Akvitanio.

Sed, koncerne al tiu UK, nia laboro, laŭ projekto de Marcelo, kondukis nin al nova propono de kanta spektaklo sur la stratoj de Lille. Do, fidelaj **Kompanoj**, post nia laboro pri turismo, ni ankaŭ elektis kanzonojn kaj provkantis ilin dum niaj renkontoj.

Esperanto estas ankaŭ rimedo por renkonti vojaĝantojn el la tuta mondo, do nia grupo akceptis dum pli malpli ol unu semajno Kubanon Miguel Angel Gonzalez, kiu montris al ni filmon faritan de Francoj, kiuj vizitis Kubon.

Membroj el nia grupo laboras naciskale (pri *La Sago*) kaj partoprenas en la mastrumado de diversaj staĝoj kaj instruado.

Nia paĝo ĉe *Fejsbuk* estas ŝatata de 69 homoj el la tuta mondo, Brazilo, Rusio, Pollando, kaj eĉ Renato CORSETTI ŝatas ĝin.

Sed mi devas konstati, ke nia grupo malfortiĝas: la plej aĝaj homoj malaperas kaj ni ne sukcesas konvinki junajn homojn lerni la lingvon kaj partopreni en niaj agadoj.

Do post la kongreso, se ĝi ne aperos sufiĉe en la medioj por novbaki esperantistojn, mia demando estos: *Kion fari hodiaŭ?* Ne tre originala demando, K-do Lenin' faris la saman lastjarcente. Se la grupo deziras pluvivi, ĝi devos denove pli-grandiĝi. Esperantujo ne estas sekto: estas tre facile eliri el ĝi. Ni renkontis multajn Ĝirondianojn, kiuj forlasis nin post kelkaj monatoj aŭ kelkaj jaroj. KIAL?

Tuj post la raportoj, ni voĉdonos por la venonta estraro. Se iu deziras kandidati por la posteno de Prezidanto, **Bonvenon!** Se neniu sin nomas, mi pretas daŭrigi unu jaron pli, laŭ la samaj kondiĉoj kiel pasintajn jarojn.

Mi deziras tre fruktodonan laboron por la venonta jaro, kaj plenan sukceson por nia animado en Lille.

Aprobata

Marcelo: samopinias pri la neceso revigligi la grupon.

2. Agadraporto (Janine)

Esperanto-Gironde multe laboris de post la antaŭa ĝenerala asembleo, ĉefe rilate al du gravaj aferoj: la Turisma Gvidlibro kaj la arta animado de la Lilla Universala Kongreso de 2015.

La 2an de decembro 2013, ni kunvenis dum la posttagmezo por labori pri TGL.

La 15an de decembro, ni festis Zamenhof-on kaj profitis la okazon por plu labori pri TGL, sed ni ankaŭ laboris pri la projekto de artaj aranĝoj de la Lilla UK. Cetere ni spektis la filmon *Esperanto*, de Dominique Gautier, pri kies efiko ni diskutis.

La 12an de januaro 2014, ni festis la reĝojn kaj pliafoje profitis la okazon por labori pri TGL kaj antaŭeniri en la arta Lilla projekto. Morine kaj Isabelle helpis nin provkanti, kaj ni komencis elekti kanzonojn por la surstrata kunkantado.

La 2an de marto, ni daŭrigis la laboron pri TGL. La tekstoj nun ekabundas, sed restas la problemo de la eldono de la slipoj (programaro, modelo, formato, ktp.) ĉar ne ĉiuj el ni disponas pri la samaj iloj. Ni ankaŭ preparis la alvenon de la kubano Miguel Angel Gonzalez (MAG) en majo-junio 2014, okaze de lia turneo tra Francio.

Inter la 29a de majo kaj la 6a de junio pluraj el ni gastigis lin: Bernardo en Le Haillan, kie MAG prezentis prelegon pri Kubo kadre de la asocio France-Cuba, Bernard Vidal en Gujan Mestras, kie MAG renkontis membrojn de la loka grupo, Joël en Sablons kaj Libourne kaj Ge-Dumoulin en Montendre, kie MAG prezentis prelegon pri Kubo, kadre de la Festivalo de la Tero.

La lasta kunveno okazis la 5an de julio. Ni raportis pri la vizito de MAG, kaj la opinioj estis miksitaj. Poste ni denove laboris pri TGL kaj decidis starigi precizan kalendaron: ni definitive elektu la modelon de la slipoj laŭ Publisher okaze de la ĝenerala asembleo la 28an de septembro kaj tiam decidis firman daton por duontago da trejniĝo pri Publisher.

Ni ankaŭ precizigis la artan Lillan projekton kaj ekpreparis la kanzonstaĝon de la 11a kaj 12a de oktobro kaj provkantis.

Ni fine spektis lumbildaron de Marcelo pri lia vojaĝo en Rumanio.

Aprobita

Neniu rimarko pri la raporto.

3. Financa raporto (Monique)

- La « gestion » (318,67€) comprend les envois postaux de LEGI, convocations etc.
- Adhésions / Abonnements à SAT-Amikaro: Sur les 380€ encaissés, seuls 310€ sont envoyés à SAT-Amikaro.
- Librairie, matériel: deux films *Esperanto* ont été achetés; l'un est chez Joël, l'autre peut-être chez Jean-Seb.
- Les frais de « missions réception » concernent surtout la venue de Miguel Angel Gonzales. Il a été convenu que toutes les associations qui l'ont accueilli contribuent pour 75€. Espéranto-Gironde a dépensé 97,50€ (billets de train, achat d'une carte de téléphone...).

Il est décidé de laisser à Yves Nicolas les 22,50€ restants à valoir sur une prochaine tournée.

- Cotisations: sont comptées les cotisations de 30 membres pour 2013, auxquelles s'ajoutent 40€ de l'année précédente, qui n'avaient pas été comptés pour l'assemblée générale 2013.

Claudine: remarque que le groupe s'amenuise: 30 cotisations en 2013, contre 33 en 2012.

Aprobita

4. Elekto de la nova estraro (Bernard)

Neniu nova kandidato por la diversaj postenoj.

Ĉar ĉiu membro de la antaŭa estraro bonvolas rekandidati, la voĉdono aperigas la jenajn rezultojn:

Prezidanto: Bernard Sarlandie

Kasistino: Monique Dussenty

Sekretariino: Janine Dumoulin

Vic-sekretariino: Morine Stride

Monique: deziras, ke Bernard havu la subskribrajton por la ĉekoj.

5. Laborplano (Marcelo)

La venonta renkontiĝo estos la kanzonstaĝo. Ne eblos viziti ŝipon Hermione, kiel antaŭvidite, ĉar la enirbiletoj estis plej rapide forvenditaj.

a/ Pri TGL

Ni fiksi daton por venonta kunveno, dum kiu okazos trejnado pri la uzo de Publisher. Ni konkrete preparos la unuan slipon. Laŭeble ĉiu venos kun sia komputilo.

Monique: ĉar ŝi ne havas tekkomputilon, proponas ke la kunveno okazu ŝiahejme.

Bernardo: zorgos pri la akiro de la lasta versio de Publisher (kun plurkomputila uzrajto).

Marcelo: Estas malfacile instali programaron sur pluraj komputiloj pro komunik-malebleco PC#MAC.

Dato de la laborkunveno: vendredon la 14an de novembro, ĉe Monique.

b/ Diversaĵoj

Bernardo: intencas kontakti la respondeculinon de la laborborso por prezentado de la loko en Esperanto, kaj por proponi projekciadon de la filmo *Esperanto* en la loko.

Joël: informas, ke li daŭre ricevas leterojn el la municipo de Cenon, anstataŭ Bernard.

Cetere Brigitte Robert el Floirac deziras donaci Eo-librojn.

Gloria: Eble Mari-Elen povus esti interesata por sendi al Maroko.

Monique: ricevis mesaĝon de Jérôme Guillard, interesata por kursoj de Eo.

Cetere, dum ŝi ferias en Grésillon, ŝi renkontis Isabelle Nicolas, kiu deziras havi informojn pri René Damarin (« Paradizo tuj »), por paro, kiu deziras estiĝi Eo-komunumon.

Gloria, Bruno, Bernardo, Marcelo, Monique, Joël vizitos lin. Gloria skribos al li por interkonsenti pri iu dimanĉo.

Marcelo: kunportis el la SAT-kongreso en Dinano la novan eldonon de *Dictionnaire pratique* kaj KD-on de Maragan' (tutan albumon en Esperanto). *Vd recenzon p. 22.* Cetere Louise daŭre havas la libron de Simone kaj ŝatus seniĝi je ili.

Joël: La grupo de Galgon povus esti interesata.

Morine: La grupo de Créon konsistas el 4 membroj (Marie-Thérèse, Catherine, Speranza kaj Morine). Ili lernis la bazojn kaj nun bezonas interparoli kun aliaj homoj por progresi.

Joël: La grupo de Galgon serĉas solvojn por organizi renkontojn inter la du grupoj. Eble povus esti en kafejo, ekzemple en Libourne.

Bernardo: voir avec Brigitte Durafour à Libourne.

Joël: Il existe un bar à Libourne qui met une salle particulière à disposition. Voir «Le Lorient». Ce n'est pas gratuit.

Ŝrankoj en Palmer:

Marcelo: En la kunvenĉambro de la sidejo, oni disponas pri kvar ŝrankoj (du aĉetitaj de Eo-G, kaj du disponigitaj far la kulturcentro. Sed la ĉambro estas ankaŭ uzata por kudradkursoj, kaj necesas loko por loki la kudromaŝinojn. Do la enteno de du ŝrankoj (divers-speca arkivo de Eo-G) devas esti metita aliloken. La kulturcentro disponigas alian lokon: la projekciejon, ĉambro kun mallarĝa pordeto al la teraso, kiu ebligas preskaŭ rektan komunikadon kun la kunvenĉambro. La loko devas esti purigita kaj senigita je ĉio, kion ĝi nun entenas.

Monique: Ni devas trovi malaltajn ŝrankojn.

Kantogrupa «Ni kantas»

Claudine: renkontis la grupon «Ni kantas» okaze de la «Journées du Patrimoine». Temas pri kvar francaj studentinoj, kiuj muzikas (akordiono, gitaro, perkutiloj, klarneto), kaj kantas en diversaj lingvoj. Unu el ili jam informiĝis pri Esperanto, la grupo bonvolas pli profunde interesiĝi pri la lingvo.

c/ La kanzonstaĝo

- Aliĝoj: surpriza nombro: 34. Homoj venos el malproksimaj lokoj: Parizo, Bretonio, Limoges, Poitiers, Béziers, eĉ Svislando ktp.

- Loĝado: Bruno malĉeestos sed lasos sian loĝejon, la filino de Monique povos gastigi du... Ĉiuj partoprenontoj estos gastigitaj.

- Listo de la partoprenontoj prezentita de Marcelo. La programo kaj la listo de la gastoj/gastigontoj estos baldaŭ senditaj.

Programo: Les organisateurs accueilleront les participants à partir de 10h30.

Les musiciens travailleront ensemble à partir de 11h (mais Isabelle ne sera présente que dimanche).

Pour dimanche matin: prévoir de partir tôt pour être à l'heure devant l'Hermione.

- **Tarif:** 38 €, soit 11,50 € x 2 pour les repas du samedi soir et du dimanche midi + 15 € d'adhésion.

- **Brochures:** les coûts doivent être bien séparés:

- ceux qui concernent la vie du stage;

- ceux qui concernent la préparation au Congrès (brochures): donc les frais d'impression des brochures ne sont pas pris en compte dans les coûts du stage.

Les Kompanoj ont fait une proposition de spectacle, animation de rue, avec pour compensation l'inscription gratuite au Congrès pour chaque artiste + 3000€. Julia espère trouver des sponsors. Un appel du LKK de Lille en ce sens a déjà été publié dans la revue *Esperanto*. 1500 € ont été récoltés jusqu'à maintenant.

Lille Métropole ne consent à apporter un financement que pour des animations ouvertes à tout public: la «nacia vespero» est une manifestation fermée, donc la municipalité refuse de la financer.

- **Spectacle de la première soirée à Lille:** pour l'instant il s'agit, en première partie, de se concentrer sur Brel en espéranto et pour la deuxième partie sur des chansons extraites de ce qui sera présenté en spectacle de rue. Le public sera accueilli par le géant Naturamiko.

- **Surstrata kantado:** devant l'Opéra de Lille, le mardi ou le jeudi après-midi.

(Post la tagmanĝpaŭzo, **Marcelo** projekcias bildaron pri sia vojaĝo laŭ la Danuba delto.)

- **Livret de chansons:** pas encore tout à fait prêt. Fabrice et Muriel travaillent sur les partitions.

Forme définitive: 4 pages de présentation couleurs, couverture plastique transparente, chansons.

Chansons: Flora avait proposé une chanson extraite de la comédie musicale *Les Misérables*, dont Vito avait adapté les paroles. Le problème est que cette chanson (en français) a été reprise par Sardou qui a ajouté des paroles qui ne conviennent pas à notre projet; si nous la chantions, le public penserait aux paroles de Sardou...

Donc nous approuvons la proposition de Marcelo de ne pas inclure cette chanson.



Il faudra conserver les brochures d'un stage à l'autre.

- Projet Lille: Le public sera accueilli par Naturamiko, le géant de 4,50m.

Le projet est porté à la base par les Kompanoj et les Naturamikoj.

Banderole verticale: ne comportera pas de logo d'Espéranto-Gironde, car il n'est pas possible de l'agrandir. Le logo des Kompanoj convient jusqu'à une taille A4.

Naturamiko sera sur scène la première soirée.

Qui veut fabriquer une ou deux grosses têtes pour accompagner le géant?

hauteur 1m pour le support jusqu'au cou + 1 m pour la tête elle-même : papier mâché sur grillage ? carton sur un gros ballon gonflé ?

Marcelo peut fournir du carton déchiqueté. Pour essai, Michel veut bien se lancer dans l'aventure en essayant tout au moins quelque chose mais sans promesse de réussite. Céline la sœur de Marcelo aussi.

Morine: On peut utiliser du papier journal avec de la colle à tapisserie, détails avec du papier toilette (on enlève le grillage une fois que c'est sec). Peut se renseigner auprès de quelqu'un qui en fait.

Marcelo: FaMo a déjà reçu plusieurs propositions pour des stages ultérieurs :

- Limoges en avril.

- Pâques (4, 5, 6 avril) : pas de congrès de SAT-Amikaro, mais une journée à Grésillon : le stage de chant pourrait se dérouler sur les deux autres jours.

- Les Amis de la Nature sont prêts à organiser un stage en Champagne-Ardennes.

- Nantes : Une journée espéranto avec FaMo.

- Lyon ou Grenoble.

- Rennes ? (les Ducloyer)

- Lille en dernier.

Pas de proposition pour le sud pour l'instant. Donc huit occasions de regrouper des espérantistes.



D'autre part il y aura deux répétitions à Bordeaux avant le 25 juillet : dates à fixer avec FaMo. La première date doit être fixée à la fin du stage d'octobre.

FaMo participe à tous les stages, mais tous les Kompanoj ne sont pas tenus de participer à tous. FaMo se déplace pour des groupes à partir de 6 personnes.

Pour nous accompagner à Espéranto-Gironde nous avons Isabelle, qui est partie prenante du spectacle de la première soirée, avec un très beau piano de concert (installé pour Andreï Korobeinikov) – à confirmer.

Morine: Pour le spectacle de rue, Isabelle aura un accordéon.

Marcelo: Si elle n'en avait pas, Espéranto-Gironde serait prêt à contribuer à en acquérir un.

Les membres présents s'entendent sur le principe d'aider Isabelle financièrement pour l'acquisition de son instrument. Les modalités et le montant seront à discuter avec Isabelle.

Important : Il faut se préoccuper dès maintenant de se loger à Lille ; les Auberges de jeunesse sont réservées très tôt.

Morine: On peut aussi se loger à Marq en Bareuil, Roubaix, Villeneuve d'Ascq, qui sont proches et accessibles en métro. Peut se renseigner auprès d'amis ou famille pour trouver des hébergements à Villeneuve d'Ascq.

Marcelo: Quelques Amis de la Nature (non espérantistes) peuvent peut-être disposer d'un lit chez eux . Très important de trouver un hébergement avant même l'inscription au Congrès.

Les stages de chant sont faits pour **chanter ensemble**. La participation à l'un ou l'autre de ces stages n'oblige ni à aller à tous les stages, ni à être présent à Lille.

L'ensemble des chansons fait un peu plus d'une heure.

La kunveno finiĝas je la 16a30.

Poste, ĉar la vetero estas agrabla, la Montendranoj invitas la ĉeestantojn promeni tra Montendre kaj viziti la ĉirkaŭaĵojn de la kastelo.

Ĉiuj finfine disiĝas ĉirkaŭ la 18a.



ANEKDOTOJ

Kia hazardo!

Lastan Majon, dum la kongreso de mia sindikato en Seignosse, mi renkontis liun maljunulinon (t.e. samaĝa kiel mi). Kiel kutime, mi menciis esperanton dum unu el niaj interparoladoj. Ŝi diris al mi ke, kiam ŝi estis juna instruistino laŭ la Freineta metodo, ŝi loĝis dum unu semajno apud Bordojo, kun paro de esperantistoj. Mi sugestis ĉe Leo Robert? Ŝi ne plu memoris. Do mi diris ĉu Gajta? Jes, prave. Ŝi klarigis, ke dum unu semajno ili nutris ŝin vegetare, kaj por la lasta manĝo, Leo kuiris grandan viandaĵon nur por ŝi. Ŝi nun loĝas apud Marsejlo, kaj ŝi intencis tuj viziti siajn filon, bofilinon kaj nepon en Norvegio. Eta mondo, ĉu ne?

Bernardo

Poŝtkartoj

Dum la somero ni ne foriris sed ni ricevis poŝtkartojn. Dum la sama semajno, ni ricevis du kartojn: la unua venis de Eŭskio kun foto de paprikoj sekiĝantaj sur domfasado. La dua venis de Argentino, kie okazis la Universala Kongreso, kun foto de paprikoj sekiĝantaj sur ebenaĵo! Tre amuze! Ĉu elmigrintaj Eŭskoj enkondukis la kultivadon de papriko en Argentinon?

Lucienne

Lingvostreboj

Dum la somero ni promenis tra Pireneoj. Lun tagon ni iris al la hispana flanko por vidi la respruĉon de Garono. Ĉar ni ne povis trovi la lokon per vojindikiloj, ni demandis plurajn turistojn pri la vojo. Ĉiuj respondis «No entiendo» (hispane: «Mi ne komprenas»). Tial ni ne trovis kaj iris laŭ la kontraŭa valo. Pli alte mi ekvidis viron sobiĝantan, kiu uzis fotaparaton kun impona teleobjektivo. Li jen malrapide antaŭeniris, jen haltis fotante. Mi pensis pri marmotoj. Do mi zorge preparis en mia kapo belegan frazon en la hispana. Bedaŭrinde mankis al mi la vorto «marmoto». Kiam ni renkontis unu la alian, mi demandis:

- ¿Por favor, señor, usted esta mirando a... «*marmottes*»?

- Ah, mais vous aussi, vous cherchez des marmottes ? li respondis france kun belega sudokcidenta akĉento.

Ni kune ekridis!

Christiane

STAĜOJ



Okt. 24a-Nov. 02a:

- **AŬTUNE:** La komunaj ferioj por infanoj, familioj kaj geavoj.
- Kursoj (Stano Marček, Jean-Luc Kristos), koncertoj, promenado,

skoltado, ludoj kaj aliaj aktivaĵoj laŭ via elekto.

Okt. 24a-29a: Interkant', ĥora kantado matene kaj posttagmeze kun Maja kaj Zdravka kiel korusestrinoj.

Dec. 30a-Jan. 04a: Jarfina **FESTego** kaj Silvestra (Novjara) FESTeno laŭ franca maniero kun kostumbalo.

Animado: partoprenaj atelieroj de kantoj, ĵonglado, ŝminkado.

Spektaklo de klaŭnoj, de magio kun kontakto. Muziko, koncertoj...

M.C.E. Château de Grésillon, St. Martin d'Arcé 49150 BAUGÉ-EN-ANJOU

Tel.: 02 41 89 10 34 (aŭ 09 51 64 10 34) - Informoj: gresillon.org



Okt. 20a-23a: Praktikado de la lingvo plurnivela

Koncernas komencantojn, progresantojn (2a grado kaj pli...); trejnado pri instruado de Esperanto al komencantoj. Studado en etaj grupoj, adaptita pedagogio, familia etoso. Familioj kun infanoj bonvenaj. Gvidos A.-S. Markov.

KVINPETALO Esperanto-Centro, 4 rue du Bureau 86410 BOURESSE

Tel.: 05 49 03 43 14 (aŭ 06 07 31 67 81) - Informoj: kvinpetalo.org

NIAJ KURSOJ

- A **GUJAN-MESTRAS**, le jeudi de 15h à 17h, cours pour débutants, au-dessus du centre St Exupéry, face à la gare SNCF. (06 95 02 85 00)

- A **CREON**, le jeudi tous les 15 jours de 14h à 16h, cours pour débutants chez Morine STRIDE, 17 rue Voltaire. (06 10 07 08 58)

- En **GALGON**, ĉiun lundon de la 17a 30 ĝis la 19a 30, Joël LAJUS gvidas kurson por komencantoj kaj progresantoj. (05 57 69 26 96)

- En **CENON** (Kastelo Palmer), ĉiun lundon inter la 14a kaj la 17a, Marcelo REDOU-LEZ gvidas traduko-grupon. (05 56 21 38 64)

- En **MONTENDRE**, ĉiun mardon de la 10a ĝis la 12a, Janine Dumoulin gvidas kurson por ĉiuj niveloj. (05 46 49 45 18)



Kiel Renardo eniris la biendomon de Constant Desnois; kiel li forportis la virkokon Klarkant', kaj kiel li ne manĝis lin (daŭrigo)

Ha, Dio mia, Klarkant', li diras per sia plej milda voĉo, vi fuĝas, kvazaŭ vi timus vian plej bonan amikon. Pro favoro, lasu min diri al vi kiel mi estas feliĉa vidi vin tiel vigla kaj lerta. Ni estas samavaj kuzoj, sciu.

Klarkant' ne respondis, ĉu li restis malfidema, ĉu la plezuro aŭdi laŭdon de parenco, kiun li ĝis nun ne konis, mutigis lin. Sed, por montri, ke li ne timas, li ekantis splendan soneton.

-- Jes, sufiĉe bele kantita, diris Renardo, sed ĉu vi memoras tiun bonan Klinkanton, kiu generis vin. Ha, lin endis aŭdi. Neniam iu el lia raso atingos lian perfektecon. Li havis, mi memoras, voĉon tiel altan, klaran, ke oni aŭskultis lin de unu leŭgon ĉirkaŭe, kaj por samelspire daŭrigi sonon, sufiĉis al li malfermi la buŝon kaj fermi la okulojn.

-- Kuzo, tiam diras Klarkant', ŝajne vi ŝercas.

-- Mi, primoki amikon, parencon tiel proksiman! Ha, Klarkant', tion vi ne pensas. Vero estas, ke mi ŝatas nenion pli ol bonan muzikon, kaj pri tio mi spertas. Vi bele kantus, se vi volus; nur duonfermu la okulojn kaj ekkantu unu el viaj plej belaj arioj.

-- Sed unŭe, diras Klarkant', ĉu mi povas fidi viajn vortojn? Foru, se vi volas, ke mi kantu: de fore, vi pli bone taksos la amplekson de mia falseto.

-- Konsentite, diras Renardo, apenaŭ retroirante, ni aŭdu, kuzo, ĉu vi reale estas filo de mia kara onklo Klinkant'.

La koko, kun unu okulo aperta, la alia fermita, kaj daŭre iome singardema, tiam komencas grandiozan ariaon.

-- Sincere, diras Renardo, tio estas neniel rimarkinda. Sed Klinkant', ha, kia diferenco! Tuj post kiam li fermis la okulojn, li virtuozadis tiel, ke oni aŭdis lin de trans la korto. Sincere, mia kompatinda amiko, vi ne atingas lian perfektecon.

Tiuj vortoj sufiĉe pikis Klarkanton, por ke li ĉion forgesu, celante retrovi la estimon de sia kuzo: li palpebrumis, li ekkantis noton, kiun li daŭrigis ĝis senspiriĝo, kiam la alia, opiniante la oportunan momenton veninta, impetas kiel sago, kaptas lin je la kolo kaj forfuĝas kun sia predo. Bunta, kiu observis lin, tiam plej akute ekkrias.

-- Ha, Klarkant', mi jam avertis vin. Kial vi ne kredis min? Jen Renardo forportas vin. Ha, kompatinda mi, kio mi iĝos, senigita de mia edzo, mia majstro, de ĉio, kion mi amis en la mondo.

Sed, kiam Renardo kaptis la kompatindan kokon, noktiĝis, kaj la maljunulino gardantino de la korto malfermis la pordon de la kokejo. Ŝi vokas Buntan, Grizan, Rufetan. Neniu respondas; ŝi levas la okulojn, ŝi vidas Renardon forportantan haste Klarkanton.

«Help'! Help'! Al Renardo! Ŝtel'!» ŝi ekkrias, kaj la kamparanoj alkuras de ĉiuj flankoj.

-- Kio okazas? Kial tiu klamado?

-- Help', denove krias la maljunulino, la vulpo forportas mian kokon.

-- He, malica maljunulino, diras Constant Desnois, kial vi lasis lin fari?

-- Ĉar li ne volis atendi min.

-- Vi devus bati lin!

-- Per kio?

-- Per via ŝpinbastono.

-- Li kuris tro rapide. Viaj britonaj hundoj ne kuratingus lin.

(daŭrigota)



Desegnis Morin'

KANZONSTAĜO EN ARTIGUES-PRES-BORDEAUX

11an kaj 12an de OKTOBRO 2014

Por prepari la aranĝon «Surtrata Kunkantado», okaze de la venonta UK en Lillo, La Kompanoj proponis unuan kanzonostaĝon por ĉiuj, kiuj deziras partopreni.

La dutaga staĝo okazis en la Maison de la Promotion Sociale en Artigues-près-Bordeaux, kie ni disponis dum du tagoj pri salono.

Monique kaj Claudine, ĉarmaj kaj ri-detemaj akceptantinoj, nin atendis sabaton, ekde la 10a30 por ricevi nian pagon kaj doni al ni la kantolibreton, belege ornamitan far Marcelo.

Ĝis la 12a30, la muzikistoj, Bernard Legeay (suzafono), Françoise Noireau (violono) kaj FaMo

(akordiono) provludis, interkonsentis pri diversaj aferoj.

La pikniko okazis je la 13a, en sufiĉe agrabla vetero, kiu ebligis al la ĉeestantoj manĝi ekstere. Jam tre bona etoso, kun interdisdonado de diversspecaj manĝaĵoj.

Je la 14a, Marcelo kunvenigis ĉiujn en la salonon por prezenti la projekton. Tiu staĝo kunigas homojn, kiuj plezure kantas. La celo estas, dum la UK en Lillo, kune kanti, kaj kantigi la publikon sur la Oper-placo. Tiucele, flugfolioj estos disdonitaj al la publiko, kun kantotaj kanzonoj kaj klarigoj pri la esperanta prononco. Sed ni unue provkantu tiujn kanzonojn, por bone instigi la publikon kanti kun ni. Cetere estas antaŭvidite, ke kelkaj kantos sursceneje dum la Nacia Vespero en la 2a parto de la spektaklo organizota far La Kompanoj kaj la nordaj Naturamikoj.

Laŭ nia programo estas ankaŭ planite, ke morgaŭ ni iros por vidi la ŝipon L'Hermione, kiu ĝis lundo estas en Bordoza, kaj kantos sur la kajo en ĝia ĉirkaŭaĵo.

Je la 14a30, ni komencas nian provkantadon. Aldoniĝas al la muzikistoj Isabelle Diaz, kiu akompanas nin per piano. La elektitaj kanzonoj estas unue tiuj, kiuj kuŝas sur la flugfolio: *Tuj la Kompanar'*; *Kiam restas am' nur*; *Kiam regos am' sur ter'*; *Nordirlanda balado*; *Mina mond'*; *La dizertonto*; *Lili*. Ni plej zorge laboras, kaj tre malofte nia kara gvidanto (FaMo) devas fari al ni riproĉojn. Li kun admirinda pacienco klarigas al ni la nuancojn, la ritmon, kiujn ne ĉiuj el ni kapablas unuaŭde senti (kaj kanti), kaj senĉese nin kuraĝigas antaŭ malfacilaĵoj.





Post tiom intensa laboro, ni ja meritas bonvenan paŭzon, kaj ni povas interparoli, trinkante kafon aŭ teon kaj manĝetante kuketojn.

Re al la laboro je la 16a30, ĝis la vespermanĝo je la 19a. La vespermanĝon ni havas en la restoracio de la MPS mem, kaj ni tiel akiras la necesajn fortojn por la lasta ekzerco de la tago: ni imagu, ke ni estas la publiko, kaj ni kantu laŭ la belega lumbildmuntaĵo de Marcelo,

laŭ la diversaj kanzonoj. Luj kanzonoj, dank'al la bildoj, iĝas des pli belaj kaj korduŝaj.

Ni disiĝas je la 22a30. Ĝis morgaŭ!

Dimanĉon matene, ve!... La pluvo sin invitas, kaj ni ne povas riski kanti sub la pluvo. Do ni rezignas pri la «surkaja kunkantado» apud L'Hermione, kaj diligente laboras interne de la salono. Pjer Bouvier kunportis sian gitaron kaj aldoniĝas al la muzikistoj. Li proponas laŭ la kantoj diskretan duan voĉon, ege ĉarman.

La tagmanĝo, je la 13a, estas ege luksa, bongusta kaj abunda (el la SI-REC, kie laboras Marcelo). Ne mankas diverskoloraj vinoj (onidire, vino helpas la voĉon...). Do kun pligrandigita kuraĝo ni povas komenci la lastan trejnadon de la staĝo.

Post tiu kvara provkantado, je la 15a30, Marcelo kaj FaMo proponas, ke ni starigu komunan bilancon.

FaMo dankas al la ĉeestantoj, kantintoj kaj muzikintoj. Li dezirus, ke aldoniĝu drumisto en venonta staĝo.

Marcelo dankas la gastigintojn. La salono, en kiu okazis la staĝo ne estas tro kosta. La kanzonlibreto estis senpage disdonita, ĉar ĝi estas nur malneto. La venontaj estos venditaj. Nia staĝo estas finance ekvilibra. Li demandas al la partoprenantoj, kion ili opinias pri la staĝo, ĉu ili trovis tion, kion ili atendis, ĉu io estas plibonigenda...

Lucia Unia, el Interkant', opinias, ke ni tre bone laboris.

Morine Stride multe ŝatis la atentan etoson de la dua tago kaj la strebo al pli da precizeco en la kantado.

Véronique Bichon, el la LKK, opinias, ke tio estas tre bona maniero diskonigi Esperanton al neesperantistoj, kaj francajn kanzonojn al nefrancaj esperantistoj. Ŝi antaŭe ne konis la projekton, kaj tre ĝojis partopreni en la staĝo.

Marcelo klarigas, ke La Kompanoj prezentis la projekton al la LKK, kaj ĝi plaĉis. Fakte jam en majo 2013, Claude Nourmont kaj Xavier Devidehem insiste petis de La Kompanoj, ke ili zorgu pri arta programero de la Lilla UK.

FaMo klarigas, ke la projekto konsistas en du partoj: la Nacia Vespero kaj la surstrata kunkantado kelkajn tagojn poste. Dum la Nacia Vespero, estos unue prezento ĉirkaŭ la kanzonoj de Brel, kaj poste prezento de kelkaj el la kanzonoj, kiujn ni kantos surstrate.

Marcelo ĝojas pri la ĝenerala opinio ke la elektita repertuaro perfekte taŭgas por la projekto.

Dieter Rooke, el Interkant', ŝatis la staĝon, ĉar temas pri projekto kun preciza celo.

FaMo esperas, ke post la UK ni povos alveni kaj kanti en iu ajn evento, ie ajn, kaj aldoni pli kaj pli da kantoj. Lille ne estas la fina celo.

Françoise Noireau tre ŝatas muziki surstrate, dancigi, amuzigi homojn, havi kontakton kun homoj.

FaMo: Ni dependas de la vetero: ĉi matene ni ne povis kanti apud L'Hermione. Ni devas havi B-solvon.

Marcelo demandas, kion ni opinias pri la longeco, la ritmo de la kantado, kaj pri la daŭro de la staĝo.

Solange Durou: Taŭgis, estis ekvilibre.

FaMo: Kelkaj suferis pro la longeco de la sabata vespero. Venontfoje, ĝi devos daŭri malpli longe.

Bernard Sarlandie bedaŭras, ke ni ne povis kanti ekstere. Ni nepre tion faru antaŭ la UK.

FaMo: Niaj partituroj devas esti kovritaj por ke ili ne difektiĝu pro la pluvo. Ni devas kanti ekstere, ĉar la sono ne estas la sama, eĉ nur antaŭ la salono.

Marcelo: Ni jam ricevis plurajn invitojn, havas plurajn kontaktojn. Nun ni scias, kiel la projekto povas evolui. Ni plej rapide starigu ion. Ne ĉiuj muzikantoj kaj kantantoj estos devigataj ĉeesti ĉiujn staĝojn.

- Eble okaze de renkontiĝo de SAT-Amikaro en Greziliono, dum Pasko.

- Estas jam projekto en Limoges en aprilo.

- Eblecoj en Rennes, Bourses, Châlons-en-Champagne, kie Naturamikoj nin atendas.

- Nepre en Bordoza ĉirkaŭ la 14a de julio.

Monique Gral: Estos ebleco ankaŭ en Dijon, kie okazos la Kongreso de la Francaj Esperantistaj Fervojistoj (AFCE) en aprilo.

Marcelo: Estas kelkaj spuroj. Eble tiu staĝo naskos ideojn en la aliaj kluboj. Ĉiu rajtas fotokopii la kantaron por la klubanoj.

FaMo: Instigu viajn klubanojn.

Yannick: Ni planas enretigi la partiturojn, tekstojn, registraĵojn kaj midi-dosierojn. Ni intencas krei retpaĝaron kaj verŝajne uzos parton de ĝi por la kantoj.

Ĉar pluraj venis kun siaj memorstangetoj, Marcelo enŝutas en ilin la nunan dosieron: tekstoj, midi-dosiero, suzafono, partituroj kaj pdf-dosiero «La Kompanoj surstrate 2014», kiu enhavas ĉiujn kantojn kaj ligilojn.

Bernard Sarlandie: Kelkaj fotoj aperos sur la Fejsbuka paĝo de Espéranto-Gironde.

Marcelo: Oni povos disdoni la kantaroon al la publiko; estos bone se oni zorgos pri la fotokopioj kadre de la kluboj.

FaMo: Vi povos adapti la dokumenton: aldoni vian propran klubadreson ktp.. Ni sendos en odt.-formato la kantaroon, kiam ĝi estos preta. Ekzistas libera programo por fari partiturojn: « Muse-score ».

La staĝo finiĝas je la 16a, kaj kelkaj restas por finpurigi la salonon.

La salono estas pura, jen la adiaŭa (aŭ pli ĝuste la ĝisa) momento.

Ĝis venonta kanzona staĝo!

PS (=post staĝo): ĉu la salono estas malplena? Kompreneble ne! Pluvjako kaj dorsako pendas tie kaj tie ĉi. Amapola kaj Pjer, alvokitaj, return-veturas kaj revenas preni siajn forgesitaĵojn!

Janine kaj Marcelo



RECENZO

Kiu semas venton... Maragan' – kiu emas veton!

SAT-Amikoj jam ĝuis artan prezenton de Marielen Dezer, multifaceta talentulino el sudo-occidentala Francio; ekzemple dum la SAT-Amikara kongreso en Ĉatoruso. Tie ŝi muzikprelegis kun sia partnero Johano Burlje' (Jean Bourlier) kunkreinto de la grupo Maragan'. Ties dancmuzikojn, jen tradiciajn okcitanajn aŭ beriajn melodiojn, jen proprajn komponaĵojn, ankaŭ ĝuis la kongresintoj de la IFEF-kongreso en Artigo-ĉe-Bordozo en majo 2013. Sed ĉiĉfoje kun la tuta grupo, tio estas ankaŭ Dominiko kaj Maria. Tiu koncerto fakte signis deirpunkton de ligoj inter Maragan' kaj la esperantista publiko. Poste venis invito por somera prezento dum OSIEK-konferenco en Saint-Amand-Montrond. Efektive sub impulso kaj propono de Serĝo Sir', la grupo akceptis la defion krei tiuokaze eo-repertuaron por tuta vespero. Intensa laboro dum tri plenaj monatoj fruktodonis frandindan rezulton. La sukceso ne povis resti sen konsekvencoj, sen pli konkretaj spuroj. Tial nature la grupo survojiĝis al studio por registri KD-on. Kaj jen ĝi! Eldonita komence de somero 2014 kaj ĝi estis jam disponebla ĉe la libroservo dum la SAT-kongreso en Dinano.



Unuavide la ĝenerala etoso de la disko aspektas folkbala, ĉar ludita per tradiciaj instrumentoj (violono, tirharmoniko, akordiono, kontraŭbaso, mandolino, ktp... eĉ kukurbo el la ĝardeno uzata kiel resonilo por kalimbo aŭ sanzo, kaj pro la kampara bildo kaj senartifika foto de grupo; ankaŭ dank'al ĝia titolo *Kiu semas venton*, pluraj kanzon-titoloj - *Florplenaj vojoj*, *Paŭzo!*, *Anĝelare*, *Anjet'* - kaj malpezaj temoj de pluraj el la kanzonoj.

Tamen aŭskultante la diskon, konstatablas ke la tradicia muziko (skotiŝo, valso, mazurko) sufiĉe ofte devojiĝas el tro simple gurdigemaj refrenoj al tute ne atenditaj atingoj. Ritmo kaj etosoŝanĝoj: surprizoj! Agrablaj surprizoj! Heliko iel trobadorice pripensigas nin pri nuntempa migr-afero; kredeble trompita amantino minacas malordigi tablojn kaj flugigi seĝojn de kafejo, rakonto kun simpla akompano de pinĉitaj kordoj kaj perkutito; svingeme ĵazumas la dua melodio...

La tekstoj – ĉiuj (escepte unu) verkitaĵoj kaj tre bone prononcitaĵoj de Marielen per ŝia ŝatata basa voĉo – estas jen amuzaj, jen teneraj. Analize mankas nek sociaĵoj nek

politikaj temoj: maljunaĝo *Speguloj*, *La lanternisto*, malriĉeco *Sokrato*, tole-remo *Kiu semas venton*. Krome krone Maragan' elektis propraversie registri *La paliso*, faman kanton de Lluís Llach: «inspirfonto por rezistaj movadoj, ne nur dum faŝismo» precizigas la belkolora libreto, kiu entenas ĉiujn kanzontekstojn.

Se mi estus puristo, mi rajtus kritiki la neprofesiecon de la grupo, ke nur Mari-elen estas vera esperantistino en ĝi, ke ili vole ne reĝustigis siajn registraĵojn far la studio, nek aldonis iujn ajn eksterajn sonojn, ke koboldo sukcesis tajperarigi la enpaĝiginton. Eblus al mi eĉ pafi kontraŭ unu aŭ du malbone lokitaj akcentoj. Damaĝe sed... ĉu mi riproĉu tro rapidan ellaboradon de la tuta projekto? Fakte, mi scias, ke Maragan' jam bedaŭras ĉiujn malglataĵojn.

Tial mi preferas aplaŭdegi la grupon Maragan', kiu sukcesis tiel rapide konkretigis sian unuan esperantan kreaĵon. Ĝi simple signu, ke venos pliaj projektoj kun tiaj konkretaj realigaĵoj, kiuj nutros sin de tiuj unuaj spertoj kaj tiel ankoraŭ pli altigos la nivelon ĝis neriproĉebleco de harfendemuloj kiaj mi.

Okulume la libreto aludas pri «karmemora Sabine Ardouin». Min trafe kortuŝas tiu simpla penso al amikino, ĝis sia morto grava aktorino de La Kompanoj.

Ja mi agnoskas min kiel fervorulo, sed ne nur ĉar mi delonge konas Mari-elen. Tiu KD alportas novan spiron al la nuntempa esperantista artistaro. Ĝi tial alportas esperon. Juĝu mem!

Maragan' *Kiu semas venton* – 45mn – Eldonita de Vinilkosmo (2014)

Marcelo



GRAVAJ INFORMOJ

- La kotizoj ne ŝanĝiĝas por 2015:

ESPERANTO-GIRONDE: 17 € por unu persono – 23 € por paro

SAT-AMIKARO: 35 € por kotizo kaj abono – 14 € por kotizo sen abono

Monique, nia kasistino, atendas vian pagon!

- Nia venonta kunveno okazos **dimanĉon la 23an de novembro** en la kulturcentro **Palmer en Cenon**.

- La **Zamenhof -Tago** okazos **dimanĉon la 14an de decembro** ekde la **10a30 en Créon**, ĉe Morine.

ESTRARO
de
« ESPÉRANTO-GIRONDE »

* * * * *

Centre Culturel Château Palmer
33150 CENON
Banque Postale:
347771 F Bordeaux

* * * * *

Prezidanto: **Bernard SARLANDIE**

24, rue des Bosquets de Venteille
33185 LE HAILLAN

Tel: 06 83 29 40 13 / bernard.sarlandie@gmail.com

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**

2, chemin des Nauves
Chardes 17130 MONTENDRE
Tel: 05 46 49 45 18 / janinedum@neuf.fr

Help-sekretariino: **Morine STRIDE**

Kasistino: **Monique DUSSENTY**

76 avenue La Fontaine
33560 CARBON BLANC
Tel: 05 56 06 74 49 / monique.duss@free.fr

* * * * *

Materialon por LEGI bv. sendi al la sekretariino aŭ al:
Yannick DUMOULIN —> yannickdum@free.fr

